

# Eŭropa Bulteno

---

Novembro 2011, Numero 110

---

## NOVAĴOJ PRI EEU-KONGRESO EN GALIVO 2012

Estas finkompletigita la paĝaro de la kongreso, nome aldoniĝis prezoj de la hoteloj kaj nun eblas rete mendi kaj la hotelojn kaj la ekskursojn. Bonvolu viziti la riĉe informan paĝaron: <http://eeu-kongreso.webnode.com//>

Por finprizorgi la paĝaron kaj antaŭprepari la kongresajn kondiĉojn Maja Tišljar vizitis Galivon kaj kontrolis hotelojn, salonojn, diskutis kun la LKK-anoj. Jen ŝia raporteto



### **Irlando estas verda lando – Venu al la 9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de EEU**

Dum monatoj mi nun okupiĝis pri Irlando: mi serĉis fotojn de la kongresa regiono, de la antaŭ- kaj postkongresaj celoj, tradukis tekstojn, kontrolis faktojn. Subite mi lernis amason da aferoj pri lando en kiu mi neniam estis. Kaj finfine novembre post centfoja rearanĝado de miaj planoj kaj taskoj aperis kelkaj liberaj tagoj por flugi al Irlando la unuan fojon en mia vivo kaj viziti Galivon. La bildoj en mia kapo jam estis sufiĉe klaraj post la preparado de informiloj kaj varbiloj kiam mi somere subite multe pli deziris flugi al Irlando ol al la kopenhaga UK, sed necesis ankoraŭ atendi.

Alveninte do nun al Dublino, elirinte el la flughavena konstruaĵo mi tuj ekflaris la maron. La insulo prezentigas per salo en la aero kaj kiel atendite griza ĉielo. La vojaĝo al Galivo estis kvazaŭ el iu imagbildo pri Irlando: 2 horoj de la oriento al la okcidento de la insulo tra verdaj paŝtejoj kun ŝafoj kaj bovinoj sub griza ĉielo. Sed malgraŭ la grizeco kaj eĉ sen iu ajn folio restanta sur la arboj, ĉiuj miaj antaŭjuĝoj ĝustis: Irlando estas verda lando! Nekredeble verda.

Alveninte al Galivo mi devis trapasi la urbocentron survoje al hotelo. La urbo ĉirkaŭ mi aspektis tre simile al mia imago de irlanda urbo: miksaĵo de ŝtonaj domoj kaj buntaj muroj, de trinkejoj kaj restoracioj, tre fabelecaj en frua vintra vespero. Unua tago komenciĝis sunplena por doni al mi la imagon pri la somera kongreso. La tagoj postaj pluvaj kaj ventaj, maro griza kaj ŝtormema: okcidenta marbordo de Irlando montris sian vintran vizaĝon dum mi marŝadis tra urbo mezurante distancojn inter la hoteloj kaj la kongresejo, akompanita de ĉiam amikecaj irlandanoj el la LKK. Fakte mi tre ĝoje spertis la helpemon kaj simplecon de la irlandanoj, tute malformalaj kaj simpatiaj.



Finfine mi povas rekomendi Galivon proprasparte kaj inviti vin aliĝi al la kongreso ĉar Irlando fakte estas belega! Eĉ en pluvo kaj kun grizaj nuboj. Kaj en julio ni fakte havos la ŝancon vidi ĝin suna kaj eĉ pli verda kun la maro blua. Mi apenaŭ atendas mian sekvan vojaĝon printempe kaj mi esperas trovi kelkajn tagojn pli en mia kalendaro por vagadi iom tra la belega naturo de la regiono.

Maja Tiŝljar

## 35-A KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO



Spite al la financa monda krizo kaj al la ne tute favora veterprognozo la 35-a Kataluna Kongreso de Esperanto sukcese okazis en la kataluna ĉefurbo, Barcelono, de la 28-a ĝis la 31-a de oktobro, plus unutaga postkongreso en la apuda urbeto Subirats, ĉe la Esperanto-Muzeo.

La Kongresejo estis la kultura centro La Farinera en la kvartalo Clot, tamen ankaŭ oni okazigis aranĝojn en la kafejo Horiginal, en la tombejo de Montjuïc, en la muzika centro Tradicionàrius kaj eĉ surstrate tra la urbo.

Kvankam temis pri nacia kongreso la ĉeestantaro estis sufiĉe multnacia: preskaŭ 140 aliĝintoj alvenintaj el la kongreslando, Okcitanio, Francio, Italio, Svislando, Flandrio, Slovenio, Nederlando, Svedio, Kimrio, Brazilo kaj eĉ Tajvano.

Ofte oni prave diras ke unu el la problemoj en la Esperanto-movado estas la aliro al la neesperanta mondo, parte pro certa fermiteco de la movado mem, kaj parte pro la indferenteco aŭ la negativa sinteno de la nacilingvaj amaskomunikiloj. Kataluna Esperanto-Asocio plene konscias pri tio kaj tial starigis en siaj agadprincipoj konstantan engaĝiĝon en la

kataluna socio, kion nia nacia kongreso klare respugulis:

Antaŭ la kongreso sendado de perreta informado al la enlanda ĵurnalaro, okazigo de katalunglingva antaŭprezento de la kongreso en la sidejo de Òmnium Cultural (gravega kultura asocio dediĉita al la defendo de la katalunaj lingvo kaj kulturo).

Dum la kongreso okazis prelegoj katalunlingve pri Esperanto, la koncertoj estis malfermaj al neesperantistoj... Dank' al tiu laboro ni sukcesis reeĥon en diversaj komuniloj: tupaĝa artikolo en la alternativa semajngazeto *La Directa*, mezbona elsendo ĉe la loka televidstacio BTV, mencio en la plej aŭskultata radistacio RAC1, kaj aparte favora dupaĝa artikolo en la dimanĉa eldono de la ĵurnalo ARA.



Malfacilas la tasko raporti pri ĉiuj la diversaj eroj de la kongreso kiu estis enhave varia kaj okazis diversloke tra la urbo, kaj eĉ ekster ĝi, inkludante la postkongreson. Jen rapida laŭtaga resumo de la kongreso:



Foto de Ferriol Macip i Bonet

Vendrede la afero komenciĝis posttagmeze, dum kelkaj amuziĝis lernante popoldancojn kun Mon Cardona, aliaj povis sekvi la katalunlingvan prelegon de Ramon Rius: “kial E-o estas tiom altira”. Jam en la nokto kongresanoj kaj eksteruloj povis spekti la koncerton de Vera Girard kaj JoMo. Post la ĉarmo kaj velura voĉo de Vera sursceniĝis la muzika torento, JoMo, kiu senlace muzikis kaj kantis okcitane, esperante, katalune kaj eĉ en la lingala lingvo!



La sabato estis la plej densa kongrestago: kun ioma mediterranea prokrasto okazis la inaŭguro kun partopreno de la familianoj de nia pioniro Jaume Grau Casas kaj de magistrantano de la urbeto Subirats kiu invitis nin postkongresi tie.

Tuj ekis la prelegoj, kaj la embarasa elekto ĉu aŭskulti la prelegon de Zlatko Tišljar pri lingva politiko en Eŭropa Unio, rekte ligita al la kongresa temo aŭ artismumi? Tiukaze denove oni devis decidi ĉu aniĝi al la korusa ateliero de Carles Vela aŭ al la poezia komisiono de la genia vortĵonglisto Jorge Camacho?

Tuj poste Katalin Kováts prelegis pri io tre persona, la lingva edukado de sia filo en multlingva medio kaj la malfacilaĵojn kiujn ŝi nekredible spertis en la, nur ŝajne internacieca nuntempa Nederlando. Samtempe Kevin de Laet rakontis pri la lingva politiko en Belgujo. En la lasta triono de la matena programo eblis elekti inter prelego pri poezio de Jorge Camacho, la talismanoj de Abel Montagut aŭ katalunglingva prelego de Jordi Solé pri la elstara verkaro de Delfi Dalmau.

Dum ĉio ĉi okazis manpleno da infanoj homlupludis vartataj far' de Gemma Aramadans kaj Montse Franquesa en apuda salono; en la akceptejo eblis aĉeti librojn en la libroservo kaj KD-oj el la bunta stoko de Vinilkosmo kiu starigis ankaŭ sian budon. Ĉe la tagmanĝo la vegetaranoj povis ĝui la menuon de la kongreseja kafejo dum la aliaj devis serĉi manĝejon en la ĉirkaŭaĵo.

Post la paŭzo la aktivuloj de KEA laborkunvenis, tiuj de KEJ assembleis, dum la aliaj kongresanoj disiĝis por ĉeesti la diversaj prelegoj. Eblis elekti inter prelego de Abel Montagut pri Jules Verne aŭ la prezento de la strategio de Eŭropa Esperanto-Unio far de Zlatko. Tuj poste nia verva Boris Mandirola prezentis TEJO-n al junularo dum Rubeno Fernández elstare prelegis pri lingvistiko el ege filozofia vidpunkto. Kiel kolofono Katalin Kováts rakontis pri la aktualega Esperanto-instruado pere de la reto kaj samtempe ronda tablo okupiĝis pri ligva diverseco en EU.

Nokte kongresanoj kaj eksteruloj povis ĝui la koncerton de *Kaj Tiel Plu*. La tuta ĉeestantaro spektis ĉarman repertuaron de melodioj diversepokaj kaj diverslingvaj, kaj la plej kuraĝaj eĉ povis ilin danci.




Foto de Annarosa Andrei

Dimanĉe la kongreso malkongresejis, buso portis kvindek da kongresanoj al la tombejo de Montjuïc. Tie troviĝas en la malnova ŝtonejo Fossar de la Pedrera uzata de la diktaturo kiel amastomo kie kuŝas la restaĵoj de kelkaj miloj da viktimoj de faŝismo dum nia civila milito kaj la sekva frankisma diktaturo. Tie ni omaĝis ĉiujn la internaciajn brigadanojn inter kiuj ankaŭ troviĝis esperantistoj. Dani Cortijo rakontis pri la historiaj faktoj de la brigadanoj, tujsekve Gregor Benton,

filo de de brita brigadano rakontis al ni per precizaj kaj sinceraj vortoj pri sia patro kaj lia vivo. La rememoro al tiuj homoj, duoble heroaj, kiuj riskis la propran vivon en fora lando pro idealo de alstrebo al pli bona mondo emociigis nin ĉiuj kaj larmoj fluis el multaj okuloj. Lokigo de florbukedo kaj ludado de la peco *Kanto de la birdoj* far de Ferriol Macip kolofonis la plej kortuŝan eron de nia kongreso.

Posttagmeze oni denove renkontiĝis en la urbocentro. En rapida promeno nia historiisto Dani Cortijo gvidis nin tra la malnova Barcelono, li malkovris por ni nekonatajn faktojn kaj senvaligis misterojn kaj mensogojn de la historio de la kongresa urbo. La kuna piedirado portis nin ĝis la kafejo *Horiginal*, tie ni sidiĝis en aparta salono kie triope starantaj korusanoj mute ĉirkaŭis nin, subita mangesto de Carles Vela, kaj la voĉoj envolvis la tutan salanon kaj majstre karesis niajn orelojn. Bonega komenco por ĉarma korusa koncerto dum kiu alterne kantis TutPEKo, Cor Acord kaj la kongresanoj kiuj sekvis la kongresan atelieron.

Post la vespermanĝo la ibera bardo Jorge Camacho gvidis la poezian vesperon dum kiu oni povis frandi diversajn mallongajn poemojn laŭ elekto de la ĉeestantoj mem. Eblis konstati ke la laboro de la poezia komisiono estis sukcesa kaj fruktodona ĉar kelkaj el la poemoj laŭtlegitaj estis verkitaj de la komisionanoj mem. Se temas pri poezio oni pensas pri skribitaj poemoj sed ankaŭ ekzistas la buŝa poezio kaj en la vespero oni ĉeestis la amikan duelon inter Xabier el Eŭskio kaj Ferriol el Katalunio, kiuj disputis en poeziimprovizado. Komencis ili du sed iom post iom aliaj ĉeestantoj kuraĝis partopreni la vortan pacan batalon!

Lunde ni atingis la finon de la kongreso. Jorge fingvidis la poezian komisionon, Boris prezentis la laste fonditan Nitobe-asocion kaj ties celoj pri lingvaj rajtoj. Zlatko faris la konkludan prelegon kaj lanĉis defion por la katalunaj esperantistoj, kadre de la centjariĝo de la naskiĝo de Tibor Sekelj traduki katalunen lian plej popularan verkon: *Kumeŭaŭa, filo de ĝangalo*.



Foto de Clara Baylina

La kongreson oni fermis per komuna adiaŭa tagmanĝo en la kafejo *Horiginal*. Post paperaviadila batalo inter la tagmanĝintoj ni forlasis la restoracion, tamen la grupo ankoraŭ ne disiĝis definitive. La LKK kreis novan koncepton en la Esperanto-kongreso: “antaŭpostkongreson”. Denova enurba vojaĝeto ĝis la kultura centro Tradicionarius, tie ni okazigis kaŝtanfeston, tipe kataluna aŭtuna tradicio dum kiu oni manĝas kaŝtanojn, etajn kukojn nomataj “panellets” kaj

trinkas dolĉajn vinojn kaj likvorojn. Ĉar improvizado spicis plurfoje nian kongreson ankaŭ dum la kaŝtanfestoj oni improvizis versetojn kaj kantojn, oni dancis laŭ la akordeono de Mon Cardona, kaj tiel ni feliĉe fermis la kongreson.

Marde, dank' al la kunlaboro de la asocio "Amikoj de la Muzeo" kaj de la urbestro de Subirats (la nura publika institucio kiu helpis la kongreson) okazis la postkongreso en la vilaĝeto Sant Pau d'Ordal (municipo de Subirats) kie situas la Esperanto Muzeo fondita de S-ro Lluís Hernández Izal. Je la alveno la proksimume 40 postkongresanojn estis akceptitaj de la urbestro kaj du aliaj magistratanoj en la urbodomo. Post la nepraj prelegoj kaj salutoj oni regalis nin per kuko kaj donaceto, kaj kune kun la aŭtoritatuloj oni vizitigis nin lokan kelon kie oni instruis nin pri la vitokulturado kaj vinproduktado, ne hazarde ni troviĝis en la regiono Penedès, famkonata pro la vin- kaj ŝaumvinproduktado. En la muzeo ni estis akceptitaj de la familio Hernández kaj la nuna zorgantino de la muzeo Montserrat Piñeiro, tie oni sciigis nin pri la projektoj rilatantaj la muzeon kaj ni povis kuriozumi la milojn da libroj, revuojn, fotojn, afiŝojn, kaj diversajn objektojn de la kolekto. Post la interesa vizito okazis kuntagmanĝo kiu definitive fermis la kongresan aktivadon.

Alfons Tur

Ĉi tiu artikolo aperis iom reduktite en la decembra kajero de *La Ondo de Esperanto*


## LABORPLANO DE EEU POR 2012

La asembleo de EEU akceptis jenan laborplanon por 2012 en la asemblea kunsido en Danlando. Nun ni aperigas ĝin en la Bulteno ke ĉiu interesito povu vidi ĝin kaj kunaktivi.

1. Eŭropa konferenco pri la temo "Lingvolernado en EU: Lerni pli, kosti malpli" en Galivo (Irlando), 14.-20.07.2012 kadre de la 9-a Eŭropa Esperanto-Kongreso de EEU
2. Eŭropa konferenco kadre de Eŭropa Jaro de Aktiva Maljuniĝado kaj Solidareco inter Generacioj (2012) kun la temo "Lerni lingvojn por aktivi dum maljuniĝo", 8.-10.09.2012 en Krynica (Pollando)
3. Eŭropa konferenco »Kia estus Eŭropo nun, se EU neniam estus fondita?« en Triesto (Italio) de la 9-11- de majo 2012 dediĉita al junaj eŭropaj ĵurnalistoj kun prelegoj de gravaj politikistoj, ekonomikistoj kaj historiistoj (eksprezidantoj de ŝtatoj Stjepan Mesić, Milan Kučan, nobelpremiito por ekonomio Reinhard Selten, d-ro Francois Grin, d-ro Thomas Jansen, eksa prezidanto de kristandemokratia frakcio en Eŭropa Parlamento k.a.)
4. Iniciati popoliniciaton ĉe la Eŭropa Komisiono kun propono akcepti tekston de komuna eŭropa himno, kiun EEU jam uzas en siaj eŭropaj aranĝoj, en neŭtrala lingvo Esperanto. Se Eŭropa Komisiono aprobas la iniciaton organizi tuteŭropan kolektadon de unu miliono da subskriboj por la iniciato.
5. Okaze de Eŭropa Jaro de Tibor Sekelj, kiun proklamis EEU, organizi kaj stimuli landajn asociojn organizi multajn agadojn dediĉitajn al tiu granda Eŭropa esploristo kaj verkisto (rondaj tabloj, eldono de liaj libroj en diversaj lingvoj, ekspozicioj, prelegoj, literaturaj vesperoj, prezentoj de novaj libroj (vidu: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor\\_Sekelj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj))
6. Redaktado de informbulteno en Esperanto pri aktivado de Eŭropa Unio dum Danio prezidas la Konsilion de Eŭropo (I-VI 2012), ĝia aperigo en la paĝaro de EEU kaj retraduko al kelkaj naciaj lingvoj. Starigo de kontakto al tiu paĝaro far oficiala paĝaro [www.EU2011.dk](http://www.EU2011.dk)
7. Eldono de DVD-disko kun eŭropaj simboloj kaj valoroj laŭ la provpaĝaro jam farita ĉe [www.wix.com/dtislar/euopo](http://www.wix.com/dtislar/euopo) je 1500 ekz por disdono al Eŭropaj Parlamentanoj, kaj aro da neregistaraj organizoj

8. Organizo de interretaj konsultiĝoj inter la membraro kun la celo kolekti datumojn por Eŭropa Lingva Observatorio, kiun planas efektivigi Eŭropa Platformo por multlingveco
9. Organizo de Podia Diskuto en Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) 8-10.09.2011 kun la temo "Lingvaj problemoj kadre de eŭropa kunaktivado de la generacioj "
10. Partopreno de EEU-representantoj en proksimume 10 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn
11. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU
12. Informado de membroj de Eŭropa Parlamento dufoje en la jaro pri agado de EEU:
  - a. disdonado de la DVD kun eŭropaj valoroj kaj simboloj en 24 lingvoj
  - b. invito partopreni en konferenco pri Lingvolernado en EU: Lerni pli, kosti malpli en Galivo (Irlando)
13. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, lingvaj festival(et)oj, intensigi la agadojn dediĉe al Tibor Sekelj, aperigo de nacilingvaj libroj – tradukoj al malpli grandaj lingvoj...
14. Iniciati agadojn far landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21-a de februaro): Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj
15. Iniciati kaj stimuli la tutan esperantistaron en EU partopreni en diskutoj kaj debatoj pri eŭropaj temoj, pri eŭropa estonto, identeco, lingvo... ĉiam kiam iu organizo aŭ EU entreprenas tian publikan eventon.
16. Organizi la 9-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio de la 14-a ĝis 20-a de julio 2012 por 300 partoprenantoj el 30 landoj. Ellabori kaj administri apartan retpaĝaron pri ĝi.
17. Disvastigi inter la membraro, sed ankaŭ ĝenerale al publiko en unuopaj ŝtatoj rezultojn de antaŭaj konferencoj de EEU pri Interkultura dialogo kaj komunikado, pri du-kaj plurlingva edukado, pri eŭropaj valoroj kaj simboloj kaj pri Lernado de lingvoj en EU (post ĝia okazigo en 2012)
18. EEU kunlaboros kaj reprezentantoj de EEU partoprenos en aranĝoj de diversaj internaciaj kaj eŭropaj organizoj kiel UEA, TEJO, SAT, AVE, EDE, AEK, IKEL...
19. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj) en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro
20. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU [www.europo.eu](http://www.europo.eu)
21. Organizati kaj prepari Jarasembleon de EEU en Galivo kaj du estrarkunvenojn (en Bruselo kaj Galivo).

## JARO DE TIBOR SEKELJ



1. GRAVE: Propono al Guglo  
Subtenu la proponon al Guglo signi la nomon de Tibor Sekelj la 14-an de februaro. Skribu anglalingve al la jena adreso ke vi proponas aŭ subtenas la proponon: [proposals@google.com](mailto:proposals@google.com)
2. UEA dediĉis sian malferman tagon la 26-an de novembre al Tibor Sekelj. Interalie prelegis pri li Spomenka Štimec (vi povas vidi la filmon en UEA-paĝaro).
3. Kataluna E-kongreso interalie konkludis ke necesas eldoni Kumeŭaŭa de Tibor Sekelj ankaŭ en la kataluna traduko.



4. En Subotica (Serbio) la Urbo dediĉos tuttagan solenaĵon al Tibor Sekelj en majo 2012.
5. En Zagrebo la Etnologia Muzeo organizos apartan ekspozicion kun objektoj donacitaj de Tibor kaj objektoj pruntitaj *de Muzeo en Senta (Serbio) kiujn Tibor kolektis dum siaj vojaĝoj.*



6. *En Maribor Slovenio* oni dediĉos Zambnhoftagon la 20-an de decembro al la verkista agado de Tibor Sekelj.
7. Arno Lagrange havis prelegon pri Tibor Sekelj en sudfranca urbo baze de artikolo en Esperanta vikipedio. La prezento okazis kadre de renkontiĝo de la Langvedoka-Rusilljona Federacio (okazanta dufoje jare) ĉi-foje en le Caylar, urbeto piede de Larzak-altebenaĵo.

8. Vinko Ošlak tradukis grandajn partojn de la artikolo en E-vikipedio al la slovena kaj aperis la artikolo pri Tibor en la slovena vikipedio. Tio estas ekzemplo por multaj aliaj landoj. Faru same.

Zlatko Tišljar

## **EŬROPA KONGRESO DE VERDULOJ OKAZIS EN PARIZO DE LA 11-A ĜIS LA 13-A DE NOVEMBRO**



Plurlingva kvinopo da Verduloj de Asocio de Verdaj Esperantistoj partoprenis en la kongreso por prezenti Esperanton kaj ĉiu bone kontribuis. Manfred rekte disdonis la novan verkon de MAS "Kien la Klimato - N-ro 2" al Rebecca Harms, kunprezidantino de la Frakcio de Verduloj, Regionalistoj kaj Piratoj. De ŝi kaj de la tuta frakcio estas artikolo pri la klimata krizo en tiu-ĉi tute

aktuala numero. Kaj multaj estis surprizitaj vidi *Le Monde Diplomatique* en Esperanto (dank al <http://www.mas-co.org> kaj Vilhelmo Lutermano, al kiu ni gratulas por ĵus plenumita tri-kvarona jarcento).



Dank al Isabelle UFE pruntedonis bele grandan rubandon pri justa lingvopolitiko & Esperanto. Ŝi certe donis iom da virina etoso pere de vigla komunikado, kaj krome zorgis ke ni ne havis tranoktado-kostojn.

Michael ligis Esperanton kun sia laboro por la "Individuaj Subtenantoj de la Eŭropa Verda Partio" kaj substrekis ke ankaŭ homoj, kiuj ne estas membroj de Verda Partio en sia lando, rajtas esti subtenantoj.

Christopher kiel kunfondito de la Verda Partio en Irlando kaj ankau de AVE fortigis nin per argumentado en la angla lingvo kaj efektivigis multajn kontaktojn. Kaj Georges ege bone klarigis la gramatikajn avantaĝojn de Esperanto.

Ni ĉiuj havis multajn bonajn interparolojn kaj pluraj kiuj iam lernetis Esperanton ĝojis trovi ĝin. Nia plurkapa ĉeesto jam estis valora per si mem.

Dimanĉon antaŭtagmeze ni havis bel-agrablan & informan kunvenon en la gastejo Extérieur Quai apud la orienta stacidomo kaj poste sub la suno en ties korto partoprenis Harald kaj André kun interesaj detaloj pri la kvartalo Vauban en Frejburgo.

Manfred Westermayer

## **GAZETARA KOMUNIKO DE UEA - 11.11.2011**

Esperanto, la plej juna lingvo de la mondo fariĝos 125 jara venontan jaron. Esperanto estas la Internacia Lingvo kreita en Pollando in 1887, fare de D-ro Ludwig Zamenhof. Estas relative facile lerni ĝin; oni jam vaste rekonas ĝin kaj uzas ĝin oficiale.

Vaste uzata en Interreto kaj en turismo, ĝi ankaŭ posedas grandan originalan literaturon. Oni uzas ĝin ankaŭ por teatro, kino kaj muziko. Radio-stacioj en Brazilo, Ĉinio, Kubo kaj Vatikano elsendas regule en Esperanto. Ĉina televido elsendas en Esperanto and multaj programoj estas rete atingeblaj.

Post mallonga periodo de nur 124 jaroj Esperanto listiĝas nun en la plej supraj 100 lingvoj, el 6 800 tutmonde. Ĝi estas la 27-a plej uzata lingvo en Vikipedio, kaj ĝi estas lingvelekto ĉe Google, Skajpo, Fajrovulpo, Ubuntu kaj Facebook.

La lingvo estas en ĉiutaga uzo tutmonde kun la plej gravaj kreskoregionoj en Azio kaj Afriko. Universala Esperanta-Asocio havas konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj kun Konsilio de Eŭropo. La kreskanta uzo de Esperanto vidiĝas kun elsendoj en la lingvo de Ĉina Televido kaj ĝia uzo por anoncado fare de brita entrepreno British Telecom. La Brita Registaro ankaŭ dungas esperanton-tradukistojn.

Denaskaj Esperanto-parolantoj (t.e. homoj kiuj utiligas la lingvon de post la naskiĝo) inkluzivas Mondan Ŝakan Ĉampionon Susan Polgár, Ulrich Brandenburg la novan germanan ambasadoron en Rusio kaj Nobel Premiito Daniel Bovet. Financisto George Soros lernis Esperanton kiel infano.

Esperanto fariĝas pli kaj pli populara. La nova ampleksa retejo kun kursoj kaj lerniloj <http://www.lernu.net/> ricevas 125 000 frapojn tage kaj Esperantan Vikipedion atingas 400 000 frapoj tage.

**en la angla**

*Esperanto, the youngest language in the World will be 125 years old next year.*

*Esperanto is the International Language launched in Poland in 1887, by Dr Ludwig Zamenhof. It is relatively easy to learn ; its official use and recognition is widespread. Widely used on the Internet and in tourism, it also has an extensive original literature. Its uses also include theatre, the cinema and music. Radio stations in Brazil, China, Cuba and the Vatican broadcast regularly in Esperanto. China television broadcasts in Esperanto and many more programmes are available online.*

*After only a short period of 124 years Esperanto is now in the top 100 languages, out of 6,800 worldwide. It is the 27th most used language in Wikipedia, and it is a language choice of Google, Skype, Firefox, Ubuntu and Facebook.*

*The language is in daily use worldwide with the major growth areas in Asia and Africa. The World Esperanto Association enjoys consultative relations with the United Nations and with the Council of Europe. The increasing use of Esperanto is seen with broadcasts in the language by China Television and its use for advertising by British Telecom. The British Government also employs Esperanto translators.*

*Native Esperanto speakers (people who have used the language from birth) include World Chess Champion Susan Polgár, Ulrich Brandenburg the new German Ambassador to Russia and Nobel Laureate Daniel Bovet. Financier George Soros learnt Esperanto as a child.*

*Esperanto is increasingly popular. The new comprehensive website with courses and learning tools <http://www.lernu.net> has 125 000 hits per day and Esperanto Wikipedia enjoys 400 000 hits per day.*

## HISPANA KONGRESO 2012 OKAZOS EN ALMAGRO

La estraro de HEF decidis akcepti la inviton de la Esperantista Kastili-Manĉa Asocio okazigi la 71-an Hispanan Kongreson de Esperanto en la urbo Almagro (provinco de Ciudad Real). La Kongreso disvolviĝos de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012 (profitante la kombinojn de festoj kiuj okazas dum tiuj tagoj), eventuale kun turisma postkongreso dum la 2-a de majo.



**Almagro** estas tre bela urbo, tre vidinda, kaj kun tre altiraj turismaj kondiĉoj. Ĝi gastigis en 2010 Iberan Junularan Renkontiĝon de Esperanto, kun granda kaj ĝenerala kontentiĝo.

La organizantoj ankoraŭ laboras super la detaloj, pri kiuj oni informos dum venontaj semajnoj. Ankaŭ la programo estos prilaborata. Ni certe profitos plurajn tre interesajn cirkonstancojn. Unue, ke Almagro estas konata kiel la ĉefurbo de

la Teatro, danke al sia historia teatrejo ("corral de comedias" aŭ teatrokorto). Ni ankaŭ troviĝas en la koro de la tero de Donkiĥoto. Pli proksime al Esperanto, venonta jaro estos la 20-a datreveno de la firmiĝo de la Ibera Skolo de esperantaj verkistoj, kaj ni esperas kalkuli je la ĉeesto de pluraj el ties anoj. Fine, memoru ke dum venonta jaro ĉiuj esperantistoj festos la 125-an datrevenon de la naskiĝo de nia lingvo. Tio respeguliĝos en la kongreso, kiel grava parto de la projekto kiun HEF komencis prilabori por adekvate festi la datrevenon.

Ni invitas vin ĉiujn rezervi jam la datojn, por ĉeesti kongreson kiun ni esperas vere sukcesa. Dume, legu la unuajn detalojn en la sekcio Kongreso de nia retejo.

Tonio del Barrio

## MONDA PUPEKSPOZICIO PER ESPERANTO



Kun la ĉeesto de la urbestro kaj la ĉefaj amaskomunikiloj (NHK, Yomiuri, Asahi, Nihon Keizai, ktp.) la 1-an de oktobro 2011 estis inaŭgurita la ‘Monda Pupekspozicio per Esperanto’ en Izucu Yaşiki –sidejo de la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashikagawa-. En mia inaŭgura parolado kiel prezidanto de la Asocio, mi esprimis, ke ĉi tiu ekspozicio klare montris la gravecon de kulturaj interŝanĝoj, kion 25 artikoloj en la gazetaro de 11 landoj el 4 kontinentoj prave montris. La ambasadorino de Pollando, S-ino Jadwiga Maria

RODOWICZ-CHEWOSKA, asertis, ke la ekspozicio ‘certe estos sukcesa kaj kontribuos al la daŭra interpopola interkompreniĝo’. La Ambasadoro de Argentino en Japanio, S-ro Raúl DEJEAN, sendis gratulmesaĝon okaze de la malfermo de la evento.



630 pupoj el 22 diversaj landoj el Japanio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj Sudameriko estis montrataj dum 10 tagoj en laŭlandaj standoj. La vizitantoj trovis informojn pri la landoj kaj ilia rilato kun Japanio en la aldonaj paneloj bele ornamitaj per fotoj pri turismaj atrakciaĵoj, mapoj kaj la bildoj pri la pupsendintoj. La pupoj estis el porcelano, ligno, ŝtofo, ktp. kaj portis tradiciajn vestojn.



Unu el la plej valoraj kontribuoj estis faritaj de Vlad’ka Chvatálová, ĉeĥa Esperantisto laboranta kiel EU-interpretisto kaj gvidanto de la orfejo ‘Nabouba’ en Benino. Ŝi kolektis 52 interesajn pupojn el Benino, Ganao kaj Togolando kaj grandpakaĵe ilin portis al Belgio kaj de tie sendis al Japanio.

Ekstere la gastoj estis bonvenigataj de 22 flagoj kaj interne apud kartona terglobo troviĝis Esperanto-flago por montri, ke la kolekto estis farita dank’al Esperanto-parolantoj. Dum la ekspozicia periodo okazis tri atelieroj pri marionetfarado, ombroludado kaj en la restoracio estis servataj argentinaj vegetaraj pladoj.

Proksimume 10 000 homoj vizitis la eventon. Laŭ la enketo plenigita je la fino, la beleco de la kostumoj kaj la ĉarmaj pupvizaĝoj pleje altiris la atenton kaj vizitantoj esperas en la baldaŭa estonteco vidi aziajn pupojn. Ni celas tiel vastigi la eventon, ke ni altiru 100 000 homoj al la aranĝo.

Etsuo Miyoshi, prezidanto de la Nova Turisma Asocio



## PROpono RILATE LA EŬROPAN POPOLINICIATON PRI EŬROPA HIMNO

*EEU proponas ke EU oficialigu la kantadon de eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto*

Temas pri alkroĉiĝo al iniciato de la Eŭropa Komisiono, LA EŬROPA CIVITANA INICIATO, por pli efike funkciigi la nunajn Eŭropajn Traktatojn, do io por plibonigi la eŭropan integriĝon. Tio devas resti centra, alikaze la Komisiono simple rifuzos registri iun ajn proponon kiu ne sekvas la regulojn. Dum aprilo 2012 estos centoj da artikoloj pri la novaĵo en ĉiuj 27 EU-landoj.

La peto devas esti definitiva en aprilo 2012. Aparte gravas ĉiu vorto de la propono, ekzemple, ke ni menciu ke temas pri "tradicia" himno ene de EEU, verkita de Umberto Broccatelli. Ofta kritiko de Esperanto estas ke ĝi estas "iu artefaritaĵo sen tradicio, historio aŭ kulturo" kaj gravas montri ke ni havas niajn tradiciojn.

La prezidano de EEU, Seán Ó Riain, skribis en Europa Bulteno Julio/Aŭgusto 2011, No 107: Ĉu ni trafos la trajnon de aprilo 2012 aŭ maltrafos ĝin? Ni estu tute klaraj pri unu afero: la komenco de eŭropa civitana iniciato estas neripeteba okazo por diskonigi Esperanton kaj se ni ĝin maltrafos, ni faros grandan eraron. Sed mi kredas ke ni estas sufiĉe inteligentaj por saĝe agi. Kaj ni havas precize 8 monatojn por fari la necesan laboron. Ni eku!

Nun restas ankoraŭ iom pli ol kvar monatoj. Se la varbado havu iun ŝancon je sukceso, ni jam nun devas prepari la preparadojn en sociaj medioj. Unu el tiuj estas havi perfektan registraĵon de ĥorkantado de la himno. Vi konas la melodion de tiu himno kaj la teksto en Esperanto ?

Por la teksto klaku sur

<http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=151&filename=europa-himno-1-vocxa.pdf>,

sed vi povas ankaŭ audi sonregistraĵon laŭ kantado de operkantisto de Zagreba Opero Neven Mrzlečki kun orgeno. Aŭ vi klakas sur 'Eŭropa himno' en la retpaĝo

<http://www.europo.eu/eo/euhropa-himno>.

Bedaurinde mi ne trovis ELŜUTEBLAN sonregistraĵon kun ĥoro. Ĉar en multaj landoj de Eŭropa Unio estas entute centmiloj de ĥorkantantoj, gravegas, ke ni popularigu ekde nun jam relative facile kanteblan version kun ĥoro.

Kiu el vi aranĝos en via programo ekzercadon sub gvido de iomete kapabla ĥorestro, kiu rezultigos sonregistraĵon?

Poste ĝi estos metita en YouTube kaj en multaj aliaj retejoj (mi nun informpetas pri la maniero realigi tion en mia lando, ĉar en Nederlando ekzistas miloj da ĥoroj).

Mi mem iros al Novjara Renkontiĝo en Bitburg kaj espereble konvinkos la partoprenantojn tie ekzerci por registraĵo. Ne manku en tiu oportunaĵo!

Johan Derks

P.s. Tiu bona propono kaŭzis ke la estraro de EEU ekplanas kampanjon inter eŭropaj ĥoroj, kiuj ja ekzistas milmilope enmeti en sian repertuaron nian Esperantan Eŭropan himnon kiun ili kantu en diversaj okazoj, aparte okaze de Eŭropa Tago.

## **APERIS GRAVA LIBRO PRI LINGVA DEMANDO EN EŬROPO**

Mi povas informi la legantojn pri nova libro de prof. Philippe Van Parijs, tutmonde gvida teoriulo kaj fama ekonomikisto pri la temo de “lingva justeco por Eŭropo kaj la mondo” :  
“**Linguistic Justice for Europe and for the World**”.

La informo pri la libro troviĝas ĉe:

<http://ukcatalogue.oup.com/product/academic/politics/science/9780199208876.do?sortby=bookTitleAscend>

Herman Deceuninck

### **Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 30-an de novembro 2011**

**Redaktoro: Zlatko Tišljar**

**En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Alfons Tur, Manfred Westermayer, Tonio del Barrio, Etsuo Miyoshi, Johan Derks, Herman Deceuninck**

**Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)**

**Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>**

